

Prezidanto : Drs F. Roose, J. & M. Sabbestraat, 12, Brugge-Tel.: 31981
 Sekretariejo: Iserentant R., Steenweg op Blankenberge, 86, Brugge
 Interŝanĝo : Maertens Grég., Nieuwstraat, 54, Assebroek-Brugge
 Poŝtkonto : 291429 - Maertens Grég. Assebroek.

LA LUMO EL LA ORIENTO.

En la fama romano "La pluvoj venis" de Louis Bromfield, Hindujo, estas nomata lando mistera, malluma, kun kelkaj lumpunktoj. Kaj efektive, ni okcidentanoj ne kapablas kompreni ĝin. Meze en densaj arbaregoj, ni subite malkovras konstruaĵojn belegajn, mastroverkojn de arkitekturo, mirindaĵojn de grandeco kaj forteco; kun kolosaj statuoj multbrakaj kaj multkapaj, kun la enigma vizageŝprimo, multfoje ripetata en la aregoj de malgrandaj statuetoj, bareliefaj skulptaĵoj sur la templaj muroj. Lando de ne imagebla riĉeco en oro, juvelŝtonoj, perloj, fruktodoneco de tero, kaj samtempe de mizerega vivnivelo. Kiuj ideoj estas al la bazo de tiuj strangaj popolkutimoj? de tiuj religiaj ritoj? unuvorte de tiu civilizado? Por ekkompreni tion, oni devas legi la sanktajn en sanskrita lingvo librojn de la Hinduoj, same kiel oni devas legi la biblion por kompreni Kristanisman kaj okcidentan kulturon. Laŭ nia scio, nur unu de tiuj libroj estas ĝis nun en Esperanto tradukita kaj publikigita. Ni ŝuldas grandan dankon pro tio al nia kompetenta samideano Francisco Valdomiro LORENZ kaj al la LIVRARIA da Federação E. Brasileira kiu eldonis ĝin. La koncerna libro estas "La kanto de l' Sinjoro". Aŭ originale "Bhagavad-Gītā" kiu mem estas fakte nur parto de pli ampleksa libro. Same kiel en la Biblio estas plej diversspeca literaturo kiel poemoj, kronikoj, genealogiaj libroj, biografioj, paroladoj, k.t.p. tiel ankaŭ la antikvegaj Hinduaj libroj ne nur konsistas el moralaj traktadoj sed ankaŭ el militrakontoj, k.t.p. La dialogo, prezentita en tiu-ĉi libro, inter la Sinjoro kaj princo Arĝuno, estas tamen interese. Estas evidente ke la libro ne legiĝas kiel moderna romano. Sed al iu kiu havas iom da kulturo kaj intereso pri moralaj, kaj religiaj problemoj, ĝi donas multajn ĝueblajn paĝojn kaj veran trezoron da saĝeco. Efektive, oni nur kapablas miregi vidante ke 1500 jarojn antaŭ Kristo en tiu malproksima Hindujo, jam ekzistis Kristanismo. Oni min komprenu: mi ne volas diri ke ĉiuj Kristanaj principoj rilate la multajn vivoproblemojn (kiel geedziĝmoralo ktp.) estis jam fidele ekzakte disvastigataj. Ne! sed la esenco de la Kristanismo: "La proksimumo kaj la rezigno al ĉio tera" ni trovas tie. Mirinde kaj vere. Ni kutimas konsideri la antikvajn Grekojn kiel la unuajn morale altstarajn homojn en la antikveco. (Sokrato, Plato, E.a.) kaj iliajn grandajn malperfektecojn kaj fakte malvirtojn rilate ekzemple la demon, ni atribuas tutsimple al la fakto ke ili ne havis eblecon lerni de Kristo. Sed tiuj Grekoj, sur la kampo de moralo, kaj tiam "moralo" en la plej vasta senco de la vorto, ne ankoraŭ atingas la kalkanojn de tiuj multe pli antikvaj Hinduoj. Oni jam ofte diris, kaj fakte mi spertis tion, ke ĉiufoje kiam oni malkovras iun veron, ke oni povas trovi ĝin en la Biblio aŭ ke oni memoras ke foje oni jam antaŭe legis ĝin tie. Efektive multe da malbonaj situacioj ripozas sur malbona fando. El malbonaj principoj tute ne povas veni bonaj situacioj. Tion oni plej ofte forgesas. Oni fakte ne veru kaj ne tre aktualatigis kion mi legis en:

-ĉap. 1 - verso 41: "kiam reĝas la malvirtoj, sociordo konfuziĝas".

Ĉi ne ĉiuj provoj de reformado restas vanaj se malvirtoj daŭras reĝi? Ĉu mi legis tion mi pensis pri tiu verso el la Biblio: "Nisi dominus aedificaverit domum, in vanum laboraverunt qui aedificant eam". (se la Sinjoro (1) ne konstruas la domon, vane klopodas tiuj kiuj konstruas ĝin).

Same, en la vivo oni daŭre spertas malbonaĵojn de la homoj, ankaŭ de tiuj kiujn oni plej emis fidi. Ĉiufoje oni venas al la konkludo ke la Biblio jam antaŭe avertis nin. La "si mem" estas kulpa pri multegaj malsukcesoj kaj seniluziigoj, almenaŭ se post objektiva pripensado, oni volas al si konfesi tion. La Biblio avertis nin kontraŭ ni mem. Ankaŭ la BHAGAVAD - GITĀ faras tion.

-ĉap. 2 - verso 55 : "Estas saĝulo la homo kiu, kun si mem kontenta, forlasis ĉiujn dezirojn, kiuj afliktas la koron"

-ĉap. 2 - verso 56 : "kaj se lin ne afekcias malagrablo nek agrablo, tim', pasio, nek kolero : estas li saĝulo sankta".

Rimarku nun la psikologie mirindan priskribon :

-ĉap. 2 - verso 62 : "Kiu pensas pri sensaĵoj (2) naskas inklinojn al ili, el inklinoj dezir' devenas, kiu kaŭzas la pasion".

-ĉap. 2 - verso 63 : "Tiu naskas malprudenton, kiu perturbas la menson, tiam perdas sin racio, kaj la homo mem sin perdas".

Vi scias, kara leganto, ke nia lando estas famkonata pro ĝiaj mezepokaj mistikuloj. Pensu nur pri Ruusbroec, Hadewijck, k.a. Komparu tiujn versojn :

-ĉap. 2 - verso 71 : "Se, libera de deziroj, egoismo kaj fiero, vivas hom' prudenta, certe trovos li sanktan Pacon".

-ĉap. 2 - verso 72 : "kiu estas vivo dia, stato de feliĉo plena kaj kiam la morto venos, li kun Dio unuiĝos".

La antikvega doktrinero Hindu estas tiel spiritualisma ke ni malfacile kapablas imagi ĝin. Ce ni, ĉiuj, eĉ ne unu momenton dubas pri la realeco de ĉi tiu vivo. Sed multaj dubas ĉu venos alia vivo post tiu-ĉi. Ce ili la kontraŭas. Multaj dubas pri la realeco de tiu-ĉi vivo, sed neniu eĉ momenton dubas pri postmorta vivo. La Materio estas io tute kaj tute senvalora; ĉio estas plena je spiritoj; ĉio servas al spiritoj. Multegaj dioj estas. Milionoj kaj milionoj. En la plej sanktega urbo Benares sole, estas pli ol 200 mil dioj. Legante la Bhagavad-Gitā oni komprenas ke ili devas konsideri nian civilizacion kiel ion degeneran... Jes, eĉ la Kristanismo por multaj inter ili devas aspekti kiel io degenera. Vi scias ke ili havas respektigon por la bestoj, ĉar ili enhavas animon de mortintoj. Kaj tial nur Sta Francisko de Asisi trovas respekton ĉe ili. Multaj versoj priskribas la renaskiĝon:

-ĉap. 15 - verso 19 : "Tial tiujn malpiulojn, miajn grandajn malamikojn, post la korp' mort' mi igas inter demonoj naskiĝi".

-ĉap. 16 - verso 20 : "Tie se ne pliboniĝas ili, devas ili renaskiĝi, al multfoje en kondiĉoj propraj infera vivo".

-ĉap. 16 - verso 21 : "Estas tri l'inferaj pordejoj : avarec', avid', kolero, ili estas evitendaj kiel plej granda danĝero".

-ĉap. 8 - verso 26 : "Tiuj estas de la mondo du eternaj sortovojoj, sen reven' la luma estas, la malluma kun reveno".

-ĉap. 2 - verso 18 : "Perej estas la korpoj, posedataj de l' spirito, nemortemaj kaj senfina.

-ĉap. 2 - verso 22 : "kiel la homoj malnovajn vestaĵojn demetas kaj surmetas poste novajn, simile la spirit' malnovan korpon forlases kaj eniras korpon novan".

Vi ĉiuj certe jam vidis bildon de iu pentofaranta, kun krucigitaj bruroj sidanta Hindu. Jen lia idealo priskribita :

-ĉap. 6 - verso 10 : "En kvietaj lok' soleca sidiĝinte, li meditas, sian menson kaj la korpon regas, sen deziro ajna".

-ĉap. 6 - verso 11 : "Sidus li en loko pura, nek tre alta, nek malalta, vestiĝinte per zontuko, ripozante sur verbenoj".

-ĉap. 6 - verso 12 : "Siajn sensojn li regante, siajn pensojn purigante,
li koncentras la plej purajn ĉiujn al l'Unika Esto".

-ĉap. 6 - verso 13 : "Ne moviĝas lia kapo, nek la nuk', nek tuta korpo,
lia vido sin direktas al l'Eterno kaj Senfino".

Ankoraŭ multe pli oni povas lerni en tiuj sanktaj libroj. Pri la kastosistemo, pri la 3 specoj de homoj, k.t.p. sed tie-ĉi sufiĉas jam. Eble vi mire demandos : Kiel estas eble ke tia instruado ne faris la sud-orientan Azion pli bona (kiel 1000 jarojn poste konstatis Budao) ol ĝi estas ? Mi respondas per alia demando. Kiel estas eble ke post 2000 jaroj da Kristanismo la Okcident-Eŭropo ne iĝis pli bona ol ĝi estas, jes eĉ pli malbona fariĝas kaj fortunigas sin de Kristanismo ?

- (1) Por traduki la latinan vorton "Dominus" (De Heer) mi ne trovas "Sinjoro" la taŭga vorto, ĉar ĝi estas same uzata por traduki "Mijnheer" kaj "Monsieur". Oni trovu alian vorton, eble "Domino"?
- (2) Sensaĵoj : ĉiuj objektoj, aĵoj, agoj, vortoj kiuj povas esti kaptataj de unu de la sensoj.

Verkis : Drs F. Roose.

B O T A N I K O - A P R I L O .

De post mia antaŭa promenado en Marto, la naturo tute ŝanĝiĝis. Kiam ĝi tiam aspektis ankoraŭ griza, ĝi nun jam verdiĝas per la varmaj printempaj sunradioj.

Oni jam povas rimarki la fikarion (speenkruid) kaj la anemonojn kaj, se vi ankoraŭ rememoras, la primolojn. Por trovi ekzemple la "Primula acutis", vi devas iri en la direkto de Syseele, kaj en la ĉirkaŭaĵoj de la Kastelo "Ten Torre"; vi ĝin trovos multope.

Nun estas mezaprilo. Cie sub kaskaĵbarilo, ĉe fosajetoj, kontraŭ malnovaj muroj, vi trovos la blankan lamion (witte doovenetel - Lamium Alba). Oni vere povas pensi ke ĝi estas la URTIKO (brandnetel), sama formo, sama foliaĵo, sama floradloko. Ĝi tiel bone similas al la urtiko ke multaj personoj timas tuŝi ĝin, pro timo ke ili estos pikataj. Sed la kampara junularo bone konas la diferencon, kaj scias ke oni povas suĉi el ĉiu de la krontuboj de la blankaj floroj, guton da nektaro.

Dum la krudaj printempaj tagoj, kiam la aprilaj kapricoj blovadas trans la kamparo, la longaj flortrunketoj multe suferas. Sed ili bone rezistas; kiam oni meztranĉas la trunkon, oni vidas ke ĝi estas malplena. Sed al la ekstera flanko, oni rimarkas kvar fortajn ripojn, kiuj donas al la trunko ĝian kvadratan formon. Kaj ĉe ĉiu folioparo estas ankoraŭ ŝirmilo por ke la malplenaĵaj trunkoj ne estu tro longaj ĉar ili tiam tamen estus malfortaj.

Cie ankaŭ nun kreskas, laŭlonge de la vojoj, familiano de la lamio (doovenetel) t.e. glekomo (Hondsdrif - Glechoma hederacea), kun belegaj blupurpuraj floretoj. Ĝi estas rampanta planto, nur la florphortantaj trunkoj rekte staras. Ĉe ĉiu folioparo de la kuŝanta trunko ekestas radikiko kun kiu ĝi fiksiĝas al la tero. De tie venas la nomo "Aardveil", nomo kiu diras pli ol la oficiala "Hondsdrif". Sed ankaŭ tiu nomo ne celas pri hundoj aŭ kurado, sed estas nur degenero de la antikva-Gota vorto Gunderaba (Germana : Grundrebe - Nederlanda : Grondrank). Ankaŭ la nuna Germana nomo Gundermann celas pri tio.



Glekomo

Tie kie la kamparo estas iomete malsekta, vi trovos certe la graciajn palpurpurajn florojn de la kardameno (Pinksterbloem-Pentekosta Floro - Carda mine Pratensis), kvankam oni ne bone elektis tiun nomon ĉar ĝi ne multe okazas ke ĝi ankoraŭ floras je Pentekoste; se jes, la printempo devas esti tre kruda kaj malvarma. Tiu floro estas la plej kutima floro de nia kamparo. La granda, facile rekonebla floro : ni tuj diras ke ĝi apartenas al la poligalacoj : kvar kalikfolioj liberstarantaj, kvar korolfolioj metitaj en krucformo, kaj

Esperantistaj internaciaj tagoj en ANGERS.

(13a - 23a de Julio 1947)

- Aliĝprezo : 100 fr.fr. (F-ino NOUAIS, 28, Boulevard Descazeaux, Angers (Maine & Loire) France.
- Programo : Ĝiutage paroladetoj, ludoj, vizitoj al vidindaĵoj, muzeoj, fabrikoj, ekskursetoj.
- Organizo : Ĝiuj dormos en komunaj dormejoj (apartaj por viroj kaj virinoj) kaj manĝos kune. - prezo po tago : 150 fr.fr. (kiuj volas apartan dormoĉambron pagos + 100 fr.fr. po nokto) - (kiuj volas ĝion aparte en hotelo pagos minimume 300 fr.fr. po tago).

SENDU TUJ ALMENAU PRINCIPAN ALIĜON !!

A L V O K O .

Ĝiuj fervojistoj intencantaj partopreni la Esperanto-Mondkongreson 1947 en Berno, estas petataj anonci sin ĝe ni (sendepende de la kongresliĝo) ĝis la 1-a de Majo 1947.

Ĝvidantoj de karavanoj komuniku al ni proksimume la nombron de la karavananoj indikante ĝu ili estas el la administracio aŭ kiu funkciado de la fervojo. Ni krome volas interdoni specialan aranĝon por fervojistoj (vizitoj, filmoj, paroladoj).

Deziroj, proponoj kaj anoncoj de paroladantoj estas dankeme, atendataj. Pri demandoj por profesia kunsido ni plezure respondos. La korespondaĵojn ĝi rilatajn, oni bv. sendu al la sekvanta adreso :
Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, Hubacherweg, 6,
Liebefeld bei Bern, Svislando.

ESPERANTO RADIO DISSENDOJ.

1. Pola Radio, Varsovio III, ondlongo 49,06 m. de nun dissendigos programon en esp. lingvo, ĝiu merkredo je horo 21-10 laŭ Greenwich Tempo.

En programo : kulturaj, politikaj, ekonomiaj, esperantaj prelegoj kaj informoj pri nuntempa Polujo.

Aŭskultu niajn dissendigojn kaj nepre skribu al "Pola Radio" Warszawa, Koszykowa, 8.

Ni atendas viajn multnombrajn leterojn, kiujn ni respondos buĝe kaj skribe.

Kun samideanaj salutoj.

Por ĝefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando.

Prezidanto : Jan Zawadz - Ĝenerala Sekretario : Isaj Dratzer.

2. Ni sciigos al vi, ke Radio Wien sendas jenon Esperanto-programon :
Merkredo, 06,35 - 06,45 MET, Wien I (Aŭstrio) 506,8 m. :

Esperanto Kurso.

Ĝaŭdo - 17,50 - 17,55 MET, Wien II, 3I m., 4I m/ kaj 228,6 m.;
Informservo.

Nepre sendu leterojn pri la sendaĵoj al RAVAG - Wien, 30 a,
Argentinierstrasse, Wien IV, Aŭstrio.

Samideane salutas vin,


Dr. Leopold Grimme.

3. Asocio de laboristaj esperantistoj F.L.E. - Postbus, 8002, Amsterdam.

Esperanto-Radio-programo de la nederlanda Radio-Unuiĝo V.A.R.A.
La dissendigo okazos je la 16.10 - 16.25 horo (mezo eŭropa temp-sistemo).

12/4/47 - La emancipa valoro de Esperanto - ondlongo: 30I metroj;
3/5/47 - Verda kabaredo - ondlongo :30I metroj;

Oni sendu simpatiesprimojn al Radio V.A.R.A., postbus 175, Hilversum, Nederlando.



Ankoraŭ fojé mi per paŝoj pezaj
Reiras al la monto de rubaĵo.
Salutas min mur-restoj jen enmezaj, -
Ruinoj de l' iama posedaĵo.

Ci tie ludis iam la infanoj.
En ĉiu ĉambro sonis ĝoj' sufiĉa.
Jen sidis mi, la plumon en la manoj, -
Jen estis mi ja reĝo rev-feliĉa.

Ho, kiom amis mi la aĵojn ĉiujn,
La kun-ligitajn firme al la koro !
Neniam rericevos mi karaĵojn tiujn.
Al mi ja restis nura rememoro. --

Silentas nun la rondo ruinara.
Nur malproksime sonas urba bruo. -
Jen estis iam mia hejmo kara,
Kaj en la domo estis ĝoj' kaj ĝuo.

La karaj arboj portas foliaĵon,
En la ĝardeno floras kelka floro. -
Rigardas mi iaman posedaĵon, -
Al mi ja restis --- nura rememoro.

Friedrich Hahn, Bremen,
Beginenland, 20, Germanio.

G E L D. speelt de hoofdrol niet bij het afsluiten van een levensverzekering. Men moet vooral K A R A K T E R en G E Z O N D - H E I D bezitten.

Een man met karakter heeft altijd geld voor hetgeen hij vurig wenscht en hem onmisbaar lijkt.

Heeft men het recht een levensverzekering tot later te verschuiven? Neen, want zonder een goede gezondheid aanvaardt U geen enkele Maatschappij. Want wie zegt U dat U toekomend jaar, of zelfs morgen nog, zult gezond zijn?

Bij gebrek aan karakter laat men de tijd voorbij gaan wanneer men geld heeft, en men bereikt den ouderdom waar men noch geld, noch gezondheid meer heeft.

Een kaartje van Uwentwege, en U ontvangt alle gewenschte inlichtingen :

R. Witvoet - De Kersgieter,
Alg. Verz. van Triëste,
Baron Razottelaan, 102, ASSEBROEK-BRUGGE.

- Por sia oro ĉiu estas sinjoro. Mono mondon regas. Montru moneron, ĉio fariĝos. Per mono eĉ silento fariĝas elokvento. Plena sako ĉiun mastron al vi klinos. Al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas.

- En sia korto ĉiu kok' estas forta. En la propra sia domo ĉiu estas granda homo. Mialoĝejo - mia reĝejo. Inter miaj muroj estu miaj plezuroj. Kio mi disponas, tio mi ordonas.

| 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 |
0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 |

(el la proverbaro de Zamenhof)